# tejo:aktuale

n°501 | Februaro 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon. Jen via raporto pri la plej freŝaj novaĵoj de la TEJO-mondo**. Ni alproksimiĝas al la eventa sezono kaj ni, la volontuloj de la Centra Oficejo, ĝojas prezenti al vi **TEJO-aktuale**. Alproksimiĝante al la ekvinokso ni deziras al vi multe da ĝuo dum viaj reaktiviĝaj tagoj. Se vi ankoraŭ ne faris, nun estas bona momento aliĝi al viaj plej ŝatataj eventoj antaŭ ol la sekva aliĝperiodo ekas.

## EVENTOJ




### Junuloj kaj Lingvoj

Lernu pri lingvoj de la mondo, praktiku tradukadon aŭ kunkantadon kaj amuziĝu en la aligatorejo en la **1-a kaj la 2-a de marto**!

Jen la ligiloj por partopreni:
Tago 1 (Zoom): https://mallonge.net/1kj
Tago 2 (Zoom): https://mallonge.net/1kk
Programtabelo: https://mallonge.net/jkl-programo

## ALVOKOJ




### TEJO serĉas komunikiston!

Kiel komunikisto, vi kunlaboros proksime kun ĉiuj organoj de TEJO (Estraro, volontuloj kaj komisionoj), por **prepari enhavojn** por niaj diversaj kanaloj, **profesie informi** pri nia agado kaj **realigi viajn kreemajn ideojn** por levi la profilon de TEJO kaj la Esperanto-movado.

La limdato por kandidatiĝoj estas la **5-a de marto 2025**.

Pli da informoj en la ligilo: https://www.tejo.org/tejo-serchas-komunikiston/




**Subtenu la partoprenon de junuloj en IJK en Indonezio**

TEJO alvokas al ĉiuj helpi en nia eksterordinara misio: **ebligi la amasan partoprenon** de junuloj el Azio, Oceanio, kaj aliaj kontinentoj en la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Indonezio.

La Fonduso “Partoprenu IJK-n” de TEJO helpas aktivajn junulojn kun malfacilaj ekonomiaj situacioj ĉeesti nian kongreson, dum kiu diversaj aktivaĵoj **kapabligas** ilin kaj **instigas** ilin al **plukontribuado al nia movado**. Ni esperas, ke ĉi-jare, vi denove subtenos la fonduson en ĝia ĉiama misio, sed kun speciala investo en aziaj kaj oceaniaj junuloj.

Legu pli kaj kaj donacu ĉe mallonge.net/subtenu-ijk2025.




**Estu parto de la Elekta Komisiono de TEJO!**

La Elekta Komisiono estas Organo de TEJO, kies ekzisto kaj funkcio estas priskribita de la Reglamento pri Elekto de Estraranoj. Ĝia tasko estas **kolekti kandidatiĝojn por la estraro** (kaj ankaŭ mem alparoli eblajn kandidatojn), **prijuĝi la kandidatojn** kaj **prezenti al la komitato strukturitan proponon por elekto de nova estraro**.

La Elekta Komisiono **laboras en sama tempodaŭro kiel la Estraro** mem kaj oficos ekde sia elektiĝo ĝis la elektado de nova Estraro por la mandato 2025-2026, planita dum IJK 2025 en aŭgusto, Indonezio.

La limdato por kandidatiĝoj estas la 4-a de marto 2025.

Pli da informoj en la ligilo: https://www.tejo.org/estu-parto-de-la-elekta-komisiono-de-tejo-3/

# VENONTAJ EVENTOJ




**La Internacia Junulara Festivalo atendas vin!**

Venu esperantumi kun ni en **Torricella di Magione** (PG), ĉe la mojosa Lago Trasimeno, **de la 17-a ĝis la 22-a de aprilo**.

La belega regiono Umbrio kaj ĝiaj spirhaltigaj pejzaĵoj atendas vin ĉiujn, kun programo plenplena je atelieroj, vizitoj, ekskursoj kaj aliaj aktivaĵoj!

Aliĝu nun: https://sites.google.com/esperanto.it/ijf2025




**Universala Esperanto-Asocio sponsoras vian partoprenon en la Poliglota Kunveno ("Polyglot Gathering")**

UEA alportas al esperantistoj du **rabatojn**: unu por la reta kaj dua por la ĉeesta evento! Por la reta (Polyglot Gathering Online, **06.03-09.03**) jen eĉ rabato por la kotizo! Enskribu la kodon "ueamojosas" en la aliĝilo (en la kampo "Rabatkodo"), kaj tio donos al vi **rabaton de 40%**.

Dua kodo estas uzebla por la ĉeesta evento en Brno (**28.05-01.06**): uzu "SenpagaT-cxemizo" kaj vi povos **elekti la ĉemizon de la evento senpage**!

Aliĝilo por la reta PG: mallonge.net/1kf
Aliĝilo por la ĉeesta PG en Brno: mallonge.net/1kg



**Ĉu vi jam aliĝis al IJK en Indonezio?**

La 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos **de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025** en **Cisarua, Indonezio**. Estos la unua IJK en Azio post 12 jaroj.

Preskaŭ 100 homoj jam aliĝis!

Vizitu la retpaĝon: https://ijk2025.tejo.org/

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

# ESPERANTO OKAZAĴOJ




Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) funebras kun la internacia Esperanto-komunumo la forpason de d-ro **Renato Corsetti**, la 1-an de februaro 2025 en Londono. Longdaŭra esperantisto kaj fidinda kunlaboranto en vasta gamo de fakoj en TEJO kaj UEA, Renato kunlaboris altvalore en tre diversaj iniciatoj lokaj ĝis siaj finaj vivojaroj.

Por pli da informoj uzu la ligilon.




Februaro estos monato plena je defioj, inspiroj kaj tradiciaj esperantistaj diskutadoj pri plej esencaj aferoj… kiel ekzemple ĉu “knufli” estas akceptebla vorto. Sendepende de kio estas via signo, vi trovos manieron aldoni iom da verda energio al la monato. 🌍




♈ Vi sentas, ke februaro estas via tempo brili en la Esperanto-komunumo. Ĉu via plej nova artikolo en *Kontakto* estos la plej legata? Nu, tio dependas de kiom da fojoj vi mem diskonigos ĝin. Tamen, atentu: enreta debato pri la plej bona traduko de "meme" povus forpreni pli da energio ol vi atendas.




♉ Vi kutime preferas stabilajn aferojn, sed ĉi-monate io subfosas vian trankvilon. Eble tio estas la sciigo, ke la venonta UK estos en urbo, kiun vi jam vizitis dufoje? Provu akcepti ŝanĝojn – aŭ almenaŭ konvinku vin mem, ke eĉ en la plej atendeblaj kongresoj troviĝas surprizoj... kiel hotelo kun senpaga matenmanĝo.




♊Februaro alportas al vi abundon da novaĵoj en viaj Telegram-grupoj. Ĉu vi partoprenos en ĉiu el ili? Kompreneble. Ĉu vi memoros pri io ajn post 10 minutoj? Nu, tio estas alia afero. Ĉi-monate via supera multitaskado atingos sian pinton, sed eble ankaŭ vian koncentriĝon suferigos.




♋ Romantika energio estas en la aero kaj vi esperas, ke via simpatiito en la retaj kursoj finfine rimarkos vian ekziston. Se ne, almenaŭ vi povas ĝui skribadon de plia amdeklaro en formo de hajka poemo pri la beleco de *krokodilado*.

♌Vi havas grandajn planojn ĉi-monate, kiel ekzemple gvidi retseminarion pri "Kial mia preferata Esperanta neologismo estas la plej bona". Ĉu iu kontraŭdiros vin? Ho jes.




Ĉu vi ĝuos la atenton? Pli ol certe. Nur ne forgesu, ke eĉ vi foje bezonas paŭzon por ripozi – aŭ almenaŭ por refreŝigi vian retligon.




♍ Estas tempo por prizorgi viajn gravajn laborojn, inkluzive de reviziado de ĉiuj artikoloj en *Vikipedio* por certigi, ke ili enhavas la ĝustan formon de la akuzativo. Atentu ne tro droni en perfektemo – jes, "pli bona" estas subjektiva koncepto, sed eble vi ne bezonas korekti ĉiun unuopan esperantiston.




♎ Vi trovas vin en profunda reflekto pri la pli grandaj demandoj en la Esperanto-movado. Kiel pliigi membronombron en TEJO? Ĉu finfine venis la tempo por denove uzi la *tutajn* supersignojn en sociaj retoj? Ĉi-monate vi inspiros aliajn per viaj ideoj, sed atentu ne tro sinki en filozofiajn pripensojn dum via taso da kafo malvarmiĝas.




**♏ La saĝaj vortoj de Jolwik Zhamele Dufez sonas jene:**

Ĉi-monate vi estas mistera kaj intensa – perfekta tempo por redakti vian plej bonan Esperantan novelon pri sekretaj esperantistaj societoj kaj konspiraj teorioj pri la Fina Venko. Nur ne forgesu, ke ankaŭ via reala vivo postulas atenton, eĉ se la ideo pri subtera organizaĵo nomata "Verda Ombro" fascinas vin.




♐ Via sopiro al aventuro estas forta kaj vi eble sentas tenton subite aliĝi al la plej proksima internacia renkontiĝo. Ĉu vi havas la monon? Eble ne. Ĉu tio gravas? Kompreneble ne. Vi trovos manieron vojaĝi – eble per *CouchSurfing*, eble per la bonvolo de afablaj samideanoj.




♑Vi estas la fidinda laboristo de la Esperanta komunumo – vi organizas eventojn, helpas kun la buĝeto, kaj eĉ provas konvinki homojn pagi sian TEJO-kotizon ĝustatempe. Sed februaro atentigas vin pri ekvilibro. Ĉu vi vere bezonas esti la persono, kiu ĉiam respondas en 30 sekundoj? Eble estas tempo lasi aliajn porti parton de la ŝarĝo.

♒Vi estas radikala en via penso – eble vi lastatempe decidis, ke la tutmonda Esperanta movado bezonas draste novan strategion. Se jes, februaro estas la perfekta tempo por prepari vian TED-talk-




stilan prezenton. Nur atentu, ke ne ĉiuj pretas akcepti viajn brilajn revoluciajn ideojn… almenaŭ ne tuj.




♓ Ĉi-monate vi sentas vin inspira kaj kreema – ĉu vi finfine ekverkos vian propran Esperantan kanton? Eble. Ĉu vi trovos homojn por toleri viajn improvizajn sesiojn dum malfruaj vesperoj en esperantista kunvenejo? Nu, eble ne tiom facile. Sed ne gravas: daŭrigu revojn, ĉar unu tagon viaj verkoj povus fariĝi klasikaĵoj.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands